

van Sitteren Pieter.

Amsterdam 17-4-1893-sed vivas preskaŭ la tutan vivon en Belgujo.

STUDO: Ĝis la fino de la lernejprograma dela Mezlernejo (Gimnazio.)

KARIERO: Ĝis ĉefkafisto de granda eldonejo en Antverpeno, kaj gvidis  
loĝaj jaroj Kultura Junularmovado.  
Mi iĝis Esperantisto en la komenco de 1911-mia instruisto estis  
Dro. Prof Frans Swaegers-kaj mi felice aŭdis la neforgeseblan  
paroladon de Dro. L. ZAMENHOF en Antverpeno 1911.

AGADO por Esperanto: Dum la unua milito, mi agadis en la mezo de la milit-  
2) kaptistoj en Harderwyk - Nederlando kaj povis organizi multajn <sup>kurs</sup>  
de Esperanto. Ne forgesu ke en tiu periodo (1914-1918) ni konstatis  
kun teruro, ke preskaŭ 65% de tiuj militkaptistoj estis analfabetoj.  
Kiam la milito finiĝis: ĈIU povis legi kaj skribi (pli ol 3000  
personoj) kaj ni edukis pli ol 300 Esperantistoj.  
Post la unua milito mi organizis en Antverpeno multajn Esperanto  
kursojn kaj fondis, la nuntempa ekzistanta, grupo "NIA IDEO".  
3) Post la dua mondmilito mi rekomencis mian agadon por disvastigi  
Esperanton en tutista mezo de la interracia Naturamikaĵ Movado  
(pli ol 300.000 membroj, ne estas nudista movado) Por tiu agado  
ni starigis internacian komisionon TANEF (turista asocio natur-  
amika Esperanto-Fako) kies prezidanto mi ~~estis~~ estas jam 18 jaroj.  
Pasinta monato mi atingis bonegan rezultaton dum internacia  
Kongreso en KOPENHAGO ke oni unanime agnoskis 'Esperanto, oficiala  
en la novaj elektitaj Statutoj  
Ni aperigas ĉia du monatoj "Informilon" kiu estas disendita  
senpage al kunlaborantoj (hodiaŭ pli ol 350 tra tuta la Mondo)  
kaj eldonas ĉia tri monatoj konstante revuon "La Migranto".  
Ni estas konviktata ke nia laboro kaj propagando por disvastigi  
Esperanton, certe, ne estas finite kaj ĉi tiu ni redaktis SLOGANO

PLANKE DE LA ĜEPATRA LINGVO

ESTRI LA MONDLINGVON: ESERANTO!

Satokupo: literaturo-Astronomio.

ADRESO. Piet van Sitteren.

Graaf de Bienneslaan 28- BDEGEM-ANTW. BELGUJO. tel: 49.66.23

RIMARKOJ KAJ ALDONOJ AL LA DOKUMENTOJ PRI  
PIET VAN SITTEREN.

---

- 1.- Sepjara li jam aliĝis al infangrupo de la Socialista Partio "Arbeidersjeugd", kaj al infanĥoro de diamantlaboristoj. Dum multaj jaroj li estis gvidanto de la Federacio de Socialistaj Infangrupoj (Federatie van Socialistische Kindergroepen), poste de la regiona Socialista Juna Gvardio (Socialistische Jonge Wacht); post la dua mondmilito li fondis la Instituton por Junulargvidantoj.
- 2.- Militkaptitoj: mi supozas ke li volas diri "rifugiĝintoj"; ĉe la komenco de la unua mondmilito multaj Belgoj fuĝis al Nederlando (memoru prelegon de Rik de Roover pri tiu temo) sed mi malfacile povas imagi de kie venus tiuj militkaptitoj.  
La filino memoras pri la ekzisto de pruvoj de korepondado esperantlingva per bildkartoj de la gepatroj dum la unua mondmilito.
- 3.- En 1946 li iĝis ano de la ĉefestraro de la Turista Asocio "La Naturamikoj" de Flandrio.  
La Turista Asocio "La Naturamikoj" (TAN), naskiĝinta en Vieno en 1895 disvastiĝis baldaŭ en Aŭstrio kaj trans la landlimojn. Ju pli evoluigis la juna movado internacie, despli kreskis la intereso por Esperanto ĉe tiuj, kiuj emis vojaĝi kaj kiuj serĉadis amikajn rilatojn kun Naturamikoj de aliaj landoj. Tial ili lernis la internacian lingvon, instruis ĝin al gegrupanoj, korespondadis, aranĝis kunvenojn kaj migradojn. Tio jam okazis antaŭ la dua mondmilito, kiu bedaŭrinde haltis tiun esperigan evoluon. Sed post ĝia fino komencis denove agado por krei Esperanto-Fakon (TANEF). En komuna laborado oni atingis novajn sukcesojn por internacia kompreno kaj Esperanto. Ni nur menciis la eldonadon de kotizmarkoj de la Centra Komitato Turista en Zŭrich ek de 1946 kun la esperantlingva surpriso "La Naturamikoj" kaj eldonon en 1951 de la oficiala ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj "La Migranto". Grandege partoprenis en tiu strebado nia amiko Piet Van Sitteren. Kun samideanoj Beeckmans, Bonte, Foquet, Van Eynde kaj kelkaj aliaj, li fondis Flandran Esperanto-Komitaton, kiu en internacia kunsido en Nancio (Nancy) en 1954 elektigis kiel la nova internacia TANEF-Komitato; prezidanto estis Piet van Sitteren.  
Kvankam lia lingva kapablo ne estis tiel brila, li akiris menciindan meriton per sia senlaca varba laboro por Esperanto; ĉiam kaj ĉie li propagandis; siatempe en Naturamika medio, la nomo Piet Van Sitteren tuj elvokis la ideon de la internacia lingvo Esperanto.  
Bedaŭrinde ni malmulte scias pri liaj lastaj tagoj; jam kelkajn jarojn antaŭ sia morto, la 8-an de novembro 1973-a, li pasigis vintron grandparte en Lloret de Mar (Hispanio) sed li tamen estis cindrigita en Bruselo.

Laŭ informoj de Ges-roj Piet Kempnaars kaj Els Senelar-Van Sitteren, aŭ reprenitaj aŭ ĉerpitaj el artikoloj en "La Migranto"j n° 1 kaj 61.

St.D.W.